

(Omāĝe al la memoro de la glora hispana poeto
en la 30-a datreveno de lia morto.)

PLORKANTO POR LA TOREADORO
IGNACIO SANCHEZ MEJIAS

POEMO ORIGINALA DE :
FEDERICO GARCIA LORCA
(1898-1936)

LA SANGO ELVERŜITA

Ne ! Mi ne volas rigardi !

Voku la lunon al mi !
De Ignac' la ŝprucan sangon
mi ne volas plu rigardi
en flak' sur l'arena flavo.

Ne ! Mi ne volas rigardi !

Sur la ĉiel' plena luno ,
kvietaj la nubĉevaloj,
l' areno griza, dormema,
kun salikoj ĉe la baroj.
Ne ! Mi ne volas rigardi !
de Ignac' la ŝprucan sangon,
ĉar poste brulos en mi
la terura memoraĵo.
Alvoku l'etajn jasmenojn
kun ties blankaj petaloj.

Ne ! Mi ne volas rigardi !

La bovin' de l'olda mondo
lekas per malgaja lango
muzelon ruĝmakulitan
de l' pluraj verŝitaj sangoj,
dum — duonŝton', duonmorto —
la virbovoj de Gisando
muĝas kiel du jarcentoj
lacaĵ de l'tera tretado.


Ne ! Mi ne volas rigardi !

Kun la morto sur la ŝultroj
alproksimiĝas Ignaco ;
kun la morto sur la ŝultroj
li suriras la ŝtuparon.
Li serĉis vanan tagiĝon
sed li ne trovas la tagon ;
li revis certan profilon
sed la rev' estis trompaĵo ;
li serĉis belan sintenon
kaj nur trovis ŝprucan sangon.

Ne ! Mi ne volas rigardi !

Ne ! Mi ne volas rigardi
la etigantajn ŝprucaĵojn
nek la flakon lumigantan
la cirkan benkoŝtuparon
en fal' sur felpojn kaj felojn
de l'soifa homamaso.
Ve ! Kiu petis de mi
ke mi rigardu la sangon ?

Ne ! Mi ne volas rigardi !



Li la okulojn ne fermis
antaŭ la korna minaco,
sed la bovinaj patrinoj
levis terure la kapojn.
Kaj tie, ĉe l' taŭrbredejoj,
sonis misteraj kriadoj
per kiuj l' taŭrojn ĉielajn
vokis nebulaj submastroj.

Neniam princ' en Sevilto
faris al li konkuradon,
nek koroj al lia koro,
nek spadoj al lia spado.
Kvazaŭ leona rivero
el li fluegis l' elano,
kaj estis marmora torso
lia saĝa toreado.
Aer' de Rom' andaluza
origis al li la kapon,
kaj estis lia rideto
lerta kaj gracia nardo.
Toreador' en la cirko !
En la montar' montarano !
Tenera ĉe l'matenroso !
Miriga ĉe l'festaj tagoj !
Milda koro por la spikoj
kaj dura per la spronradoj !
Kaj ĉiam granda kun la
lasta banderila paro !

Sed li jam dormas por ĉiam !
La muskoj kaj la herbaĵoj
malfermas per saĝaj fingroj
la floron de lia kapo.

Kaj tra kampoj kaj marĉoj kaj herbejoj
venas al ni, kantante, lia sango,
kiu glitas sur kornoj frostigitaj
kaj stumblas sub la taŭraj hufostamfoj,
senanima, dubema tra l' nebulo,
kiel longa, malhela, trista lango,
por, fine, sterni flakon agonian
de la Ĝuadalkivir' sub la stelaro.

Ho, hispana blanka muro !
Ho, nigra malgaja taŭro !
Najtingal' de liaj vejnoj !
Ignaca malmola sango !

Ne !
Mi ne volas rigardi !

Ne estas kaliko, ne !, por ĝin enteni,
nek por ĝin trinki venos hirundaro,
nek por ĝin malvarmigi falos prujno,
nek ŝuto de lilioj, nek gajkantoj,
nek diamanta pluvo por ĝin ŝirmi
en arĝenta tegado de kristaloj.

Ne ! Mi ne volas vidi !
Mi ne volas rigardi lian sangon !

Esperantigis : Alvaro De Orriols.

(Nura traduko rajtigita).